

# KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO  
SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO  
12. strato Gracia. — SABADELL  
BARCELONO-HISPANUJO

**AVIZO:** La Redakcio konservas al si la rajton korekti laŭ bezone la manuskriptojn. Neakceptitajn manuskriptojn oni ne resendas.

**ENHAVO:** II<sup>a</sup> Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio, — Literatura Konkurso. — Programa pera 'ls examens del titol de professor d'Esperanto. — La urbo de nia Kongreso: — Enlanda Movado. — Por la nefederacianoj.

## II<sup>a</sup> KONGRESO DE LA «KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO»

kiu okazos la 24<sup>an</sup>, 25<sup>an</sup> kaj 26<sup>an</sup> de Junio en  
TARRAGONA

**J**EN ni alvenantaj en la sopiritan tempon! Jen ni ĉe la sojlo de nia Kongreso! Pasis unu jaro kaj jen ni ree en la antaŭtago de nia festo, de nia plej granda festo, ĉar tia ja estas la festo de nia Kongreso.

Antaŭ ne multe ni asertis ke nia ĉiujara enlanda Kongreso estos sukceso; ke en ĝi partoprenos ne nur per morala sed eĉ per mona kunhelpo la aŭtoritatuloj de la kongresurbo; ke por ĝi laboradis la loka komitato krom ni mem; ke eĉ ni pretigis programon kiu ja superas nian propran forton: jen, do, la laboro plenumita, aranĝita. La aranĝintoj de la II<sup>a</sup> Kongreso de Tarragona donis de si mem ĉion, kio povas triumfigi nian celon, kaj vi, samcelanoj, konsentu kun ni ke ne tio sufiĉas, sed ke estas necese ke ĉiu federaciano donos sian propran kunhelpon, almenaŭ per sia ĉeesto. Per niaj vortoj, per nia gazeto, per nia propagando por la Kongreso, Tarragona kaj ankaŭ

nia lando konvinkigis, ke nia ĉiujara kunveno ne estas amuza ago, sed ago inda je la esperantisma idealo. La kongresa programo mem tion montras. Via, do, federacianoj, viglaj esperantistoj, estas la devo montri, ke ni agis bone rilate al nia afero.

Vi memoru ke la homojn, bedaŭrinde, konvinkigas pli baldaŭ la manifestacioj por idealoj ol la idealoj mem, kaj kiam la homoj vidos ke ni multenombre partoprenas la Kongreson, ke ni multenombre partoprenas en ĝiajn kunsidojn, ke ni multenombre ariĝas en niaj festoj, ili konvinkigos pri niaj celo kaj sorto.

Cetere, por nia interna agado mem, postulas de ĉiu federaciano lian ĉeeston nia Federacio. Neniu rajtas ne esti agema dum tiuj tagoj, kaj ĉar nur en la kongresaj tagoj la aferoj sin rilatantaj al niaj organizado kaj propagando devas esti pritraktataj, pretiĝu ĉiuj fariĝi kongresanoj. Vi ne forgesu ke la de la nova komitato de «K. E. F.» plenumota tasko dependas plej grandparte de la decidoj prenataj dum la kongresaj kunsidoj.

Ni ja fariĝis plenaĝaj. Ni estas sur la vojo de la ceteraj alilandaj Asocioj.

Tion ni montru, kiel ni montris per la ĵus organizita Literatura Konkurso ke ni devas kaj povas.

Al vi estas la parolo!

Ĝis la Kongreso!

## HONORA KOMITATO

*Honora Prezidanto* : Lia Urbestra Moŝto de Tarragona.

*Altaj Protektantoj* : Provincestra Moŝto, Milita Provincestra Moŝto de Tarragona, Sro. Prezidanto de la Juĝa Tribunalo, Sro. Direktoro de la «Instituto de Tarragona» kaj Sro. Delegito de Financoj.

*Honoraj Membroj* : Sroj. Prezidantoj de la Provinca Deputataro de Tarragona; de la Komerca Ĉambro; de la Agrikultura Ĉambro; del Kolegio de Kuracistoj; del «Círculo de Tarragona»; de «Atracció de Forasters»; del «Patronato del Obrero»; del «Centro Aragonés»; de la «Unión Agrícola»; de la «Unió Democràtica Nacionalista»; de la «Societat Arqueologica»; del «Centre Federal»; del «Ateneu de Tarragona»; de la «Fraternitat Republicana»; del «Ateneu Tarraconense de la clase Obrera»; de la Ruĝa Kruco; del «Gremi de Pagesos»; del «Orfeo Tarragoní»; del «Chor del Ancora»; del «Club Gimnastic»; del «Museu Arqueologic»; de la «Rondalla Tarraconense»; del «Centro de Naturales del Campo de Tarragona»; Sro. Puig i Valls, kaj Sro. Roig y Bergadà.

*Sroj. Direktoroj de la gazetoj* : *La Cruz, Diari de Tarragona, Tarragona Federal, Catalunya Nova, La Voz del Pueblo, Harmonia Social, La Reconquista, Boletín del Colegio de Médicos kaj El Ideal.*

*Loka Komitato* : Sro. Joan Molas Sabater, *Prezidanto*; Sroj. J. Solé Granell, Domenec Obiol, Josep Vidal, Fulgenci Agustí kaj Marian Alegret, *Voĉdonantoj*; Sro. Daniel Roig, *Sekretario*.

*Fako Propagando* : Sroj. Direktoro kaj Redaktoroj de KATALUNA ESPERANTISTO.

*Komitato de la Kongreso* : Dro. J. Bremón Masgrau, *Prezidanto*; Sro. J. Delclós, *Vic-prezidanto*; Sro. V. Alavedra, *Kalkulisto*; sinjoro J. Piferrer, *Kasisto-Administranto*; Sro. J. Pujol, *Sekretario*.

## PROGRAMO

24<sup>an</sup> JUNIO. — *Matene*, 12 <sup>1</sup>/<sub>4</sub> : Alveno de la kongresanoj en Tarragonan. Oni organizos en la stacidomo manifestacion irontan ĝis la Urbdomo, kie okazos je la

12'30 : Oficiala akcepto de la Aŭtoritatoj. Dum la akcepto, la ĥoro «L'Ancora» kantas krom aliaj himnoj *La Esperon*.

1 : Malfermo de la Propaganda Ekspozicio ĉe la sidejo de la Orfeó Tarragoní.

*Posttagmeze*, 4 : Solena Malfermo de la Kongreso, kun ĉeesto de la aŭtoritatoj, 4 <sup>3</sup>/<sub>4</sub> : 1<sup>a</sup> Labora Kunsido.

*Vespere*, 7 : Vino de honoro, dediĉita al la kongresanoj de la Urbkonsilantaro Tarragona. Partoprenos en la festo la musikistaro «La Rondalla».

9 <sup>1</sup>/<sub>2</sub> : Festo de la «Literatura Konkurso» kaj disdonado de premioj al laŭreatoj.

25<sup>an</sup> JUNIO. — *Matene*, 9 : Meso por katolikoj. 10<sup>a</sup> : II<sup>a</sup> Labora kunsido. 1<sup>a</sup> : Oficiala Festeno en la Hotelo Continental kun ĉeesto de la aŭtoritatoj.

*Posttagmeze*. — 4 <sup>1</sup>/<sub>2</sub> : Labora kunsido kaj fermo de la Kongreso.

*Vespere*. — 9 : Koncerto de l'«Orfeó Tarragoní» en la teatro de la societo «Patronato del Obrero». 11<sup>a</sup> : Balo en honoro de la kongresanoj, kun partopreno de militista muzikistaro.

26<sup>an</sup> JUNIO. — Ekskursoj tra la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj.

## KONGRESAJ TASKOJ

Laboraj Kunsidoj : Parolado de Dro. Bremón, prezidanto de «K. E. F.», pri la agado de la Komitato — Financa raporto de

Sro. J. Piferrer, kasisto-administranto. — Aldono al la Art. VI<sup>a</sup> de la Regularo de «K. E. F.», de la jenaj vortoj: «Els delegats serán retribuits ab el 5 % de l'import de les quotes que cobrarán, en concepte de gastos.» Ili estas proponitaj de la Komitato.

Novaj aldonoj al la Regularo:

«I. — Els grupus adherits a la Federació pagarán una quota per cada N membres o fracció de N. La Federació els servirá altres tants exemplars de la revista KATALUNA ESPERANTISTO.

II. — Els representants dels grupus tindrán un vot per cada N membres o fracció de N. El número de vots se calculará pel número de quotes que paguin.»

«I. — Els presidents dels grupus adherits a la Federació formen un Concell Consultiu de la Federació al qual podrá dirigir-se el president d'aquesta pera coneixer sa opinió en els casos que cregui convenient. El Concell informará mensualment al Comité de la Federació sobre afers Esperantistes, fixant especialment l'atenció sobre tot lo que fora de desitjar pera la mellor marxa de la Federació y de la propaganda de l'Esperanto.

II. — Será president del Concell el president de més edat, y secretari, el més jove.

III. — Els gastos d'aquest Concell correrán a cárrech dels grupus.

IV. — El dret de formar part del Concell es personal y no transferible.»

Ambaŭ reformoj estas prezentataj de Sroj. Pujulà, Pellicer, Rosals kaj Dalmau.

— Komunikajo de Sro. J. Altura, el Sabadell, pri bezono altiri al la Esperanta movado la laboristojn.

— Komunikajo de Sro. R. Pallejà, el Ulldemolins (Tarragona), pri propagando de Esperanto en vilaĝoj

— Komunikajo de Sr. J. Anglada el Barcelona pri la fondo de «Ekzamenkomisio pri Verkaro».

— Aprobo de la regularo de *Atesto pri lernado kaj profesoreco*. — Elekto de nova Komitato por la kurso 1911<sup>a</sup>-1912<sup>a</sup>. — Elekto de la urbo de la III<sup>a</sup> Kongreso.

NOTOJ: La agoj de la Kongreso, Laboraj Kunsidoj, Malfermo kaj Fermo, Oficiala Akcepto, Honora Vino kaj Festo de la Literatura Konkurso, okazos en la Urbdomo.

— La Eksposicion oni faros en la sidejo de l'«Orfeo Tarragoní».

— La koncerto de l'«Orfeo Tarragoní» okazos en la teatro de la societo «Patronato del Obrero» laŭ la jena programo:

1<sup>a</sup> Parto: 1, *Himne a la Senyera*, Gols; 2, *La Pastoreta*, Candi; 3, *La Ve-*

rema, Lassus; 4, *Primavera Eterna*, Morera; 5, *Cami de Noys*, Grieg; 6, *Somni de Primavera*, Mendelshon; 7, *Aucellada*, Jannequin.

2<sup>a</sup> Parto : 1, *Sola l'Olm*, Morera; 2, *Cançó del Borratxo*, Cogul; 3, *La Mare de Deu*, Nicolau; 4, *Barcarola*, Gols; 5, *Oh quin bon eco!*, Lassus; 6, *El Rossinyol* (La Najtingal') en esperanto, Mas i Serracant; 7, *La Espero*, de Ménil.

— La kosto de la festeno, kiun ĉeestos la aŭtoritatumoj estos 7 pesetoj. Jen la menuo :

Diversaj almanĝaĵoj; Makaronioj «Rossini», Merizo kun saŭco «mayonnaise»; Bovido «Perigot»; Galantino lango «Bellevue»; Rostita kokido.

Glaciigita biskvito; Desertoj; Vinoj: blanka kaj ruĝa; ĉampano; kafeo, cigaroj, likvoroj.

— Ĉiu esperantisto povos partopreni la Kongreson: laborajn kunsidojn nur rajtos ĉeesti la Federacianoj, kiuj havos aŭ liberan eniron, aŭ grandan rabaton por ĉiuj festoj.

— Ĉiu federaciano ricevos specialan Kongresan insignon: tiun insignon li devas ĉiam surporti ligitan al la butontruo dum ĉiu kongresa kunveno.

— La societo de «Altiro de alilandanoj», de Tarragona, metas sian sidejon je la dispoŝo de la kongresanoj: ĝi estos la «Akceptejo». Adreso: Rambla de Sant Joan.

— Etlajn modifojn kaj ŝanĝojn al tiu ĉi programo oni avizos dum la kongresaj kunsidoj.

— Por informoj pri la Hoteloj kaj horaro de la vagonaroj, vidu la kovrilon:



## LITERATURA KONKURSO

### MANUSKRIPTOJ RICEVITAJ ĜIS LA 31<sup>a</sup> DE MAJO

#### ORDINARAJ TEMOJ

*Originalaj tekstoj.* — I Versaĵo pri Amo. «Post longa sufero alvenas espero», n<sup>o</sup> 19-I. «Malvarmo», n<sup>o</sup> 22-I. «Patreco», n<sup>o</sup> 29-3. «Rozoj kaj dornoj», n<sup>o</sup> 52-4. «Tamen...», n<sup>o</sup> 67-5.

II Prozaĵo pri Amo. «En la kampoj de la deziro», n<sup>o</sup> 1-I. «Nokto», n<sup>o</sup> 2-2. «La Homaro kaj la honto», n<sup>o</sup> 3-3. «Amsongŝo al Katalunujo», n<sup>o</sup> 4-4. «Vintra nokto», n<sup>o</sup> 5-5. «Al ŝia Moŝto Dubo, la turmento de la grandaj pensuloj», n<sup>o</sup> 13-5. «Neatingebla fantaziaĵo», n<sup>o</sup> 14-7. «Printempon», n<sup>o</sup> 28-8. «Delira revo», n<sup>o</sup> 31-9. «Mucio Scevola», n<sup>o</sup> 33-10. «Kiam la fido perdiĝas», n<sup>o</sup> 46-II. «Malkuraĝeco», n<sup>o</sup> 63-12. «Kiel feliĉa mi estas», n<sup>o</sup> 66-13.

*Tradukitaj tekstoj.* — I La Vaca Cega, «La poezio estas la dimanĉa vesto de niaj pensoj», n<sup>o</sup> 8-1. «El ĉiuj estaĵoj la blinda, sendube la plej kompatinda», n<sup>o</sup> 11-2. «Kompatinda», n<sup>o</sup> 27-3. «Plendinda estas la memblindeco», n<sup>o</sup> 43-4. «Kompato» n<sup>o</sup> 53-5. «Nu...!», n<sup>o</sup> 65-6.

II Conformitat. «Trankvilulo», n<sup>o</sup> 7-1. «Bonan penson havis la avo, la vidvo», n<sup>o</sup> 9-2. «Sfinkso», n<sup>o</sup> 10-3. «Lanevoj petolas la morton de l'avo», n<sup>o</sup> 21-4. «Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras», n<sup>o</sup> 34-5. «Superstiĉo», n<sup>o</sup> 37-6. «Nur Dio estas senmorta», n<sup>o</sup> 48-7. «Maljuneco», n<sup>o</sup> 49-8. «Unu pli», n<sup>o</sup> 55-9.

*Eksterordinaraj Temoj.* — I La Ratlla. Premio de Esperanta Semo. «Unu inter aliaj», n<sup>o</sup> 12-1. «Nur por min lernigi», n<sup>o</sup> 20-2. «De ŝtat' al patrujo», n<sup>o</sup> 30-3. «Ribelo de patrolandoj», n<sup>o</sup> 32-4. «Kripligo», n<sup>o</sup> 35-5. «La Segro», n<sup>o</sup> 36-6. «Vivu mia lando», n<sup>o</sup> 45-7.

II Originala studo pri muziko, pri poezio, literaturo, aŭ pri historio. Temo de *La Revuo*.

III Kolekto de Katalunaj modismoj. Temo de la grupo «Semo» de A. E. P. el Barcelono. «Unio estas forto», n<sup>o</sup> 5-1.

IV Versduo, verstrio aŭ verskvaro povanta taŭgi, kiel devizo de «K. E. F.». Temo de Sro. Fred. Pujulà. «Katalunlando», n<sup>o</sup> 6-1. «Versduoj», n<sup>o</sup> 16-2. «Alten», n<sup>o</sup> 17-3. «Honoriga laboro», n<sup>o</sup> 18-4. «Instimulo», n<sup>o</sup> 23-5. «Antaŭen kaj Espero», n<sup>o</sup> 24-6. «Homaro», n<sup>o</sup> 25-7. «Amo», n<sup>o</sup> 26-8. «Nur rekte kurage», n<sup>o</sup> 40-9. «Pujulà», n<sup>o</sup> 44-10. «Post longa laborado ĉu ni ne venkos en decida hor'?', n<sup>o</sup> 54-11. «Verŝu vi...!», n<sup>o</sup> 64-12.

V Verko taŭgonta kiel propagandilo de Esperanto kaj kiel broŝuro disdonota. Temo de la «Círculo de Tarragona». «Esperantistigo», n<sup>o</sup> 60-1.

VI Bezono kunhelpi turismon kaj Esperantismon. Temo de la «Hotel Continental», de Tarragona.

VII Utileco de Esperanto por la internaciaj interrilatoj de studentoj. Temo de la «Federació Nacional d'Estudiants».

VIII Traduko de la parolado farita de Sr. Folch i Torres ĉe la fondo de la «Sindicat d'Iniciativa i Atracció de Forasters de Tarragona». Temo de «Catalunya Nova». «Vi frato alveninta de malproksima tero en nia varma hejmo ripozu post la ven'», n<sup>o</sup> 38-1. «Forte staras muroj da miljaroj», n<sup>o</sup> 47-2. «Ni laŭdu Esperanton», n<sup>o</sup> 58-3.

IX Tradukaĵoj; liberatemo. Temo de Sro. Direktoro de la «Institut de Tarragona». Temo de la «Cambra de Comerç de Tarragona». «Tri estis tri miaj trakukaĵoj», n<sup>o</sup> 39-1. «Ĉu...?», n<sup>o</sup> 41-2. «Iluzio»,

n<sup>o</sup> 42-3. «Tolstoi», n<sup>o</sup> 50-4. «Flugadoj», n<sup>o</sup> 51-5. «Giganto egalas grandegulon», n<sup>o</sup> 57-6. «Vivu Esperanto», n<sup>o</sup> 59-7. «Ankoraŭ», n<sup>o</sup> 61-8. «Jen», n<sup>o</sup> 62-9.

X Neceseco kaj sociaj utiloj liveritaj de la katolikaj laboristaj sindikatoj kaj influo de Esperanto por la monda disvastiĝo de tiaj asocioj. Temo de la «Patronato del Obrero de Tarragona». «Frato helpita de aliaj fratoj estas forta urbo», n<sup>o</sup> 56-1.

XI Originala literatura verko en plej bona Esperanto. Temo de la grupo «Barcelona Stelo».

XII Esperanta biografio de la fama respublikano F. Pi i Margall. Temo de la Deputato kaj Direktoro de «Catalunya Federal», Sro. Julià Nougués.

Rimarko : La grupo «Tarragona Esperanta» donos 25 pesetojn kiel akcesito al la Natura Floro.

## PREMIITAJ MANUSKRIPTOJ

### ORDINARAJ TEMOJ

*Originalaj tekstoj.* — I Versaĵo pri Amo. N<sup>o</sup> 52-4 : «Rozoj kaj dornoj».

II Prozaĵo pri Amo. N<sup>o</sup> 63-12 : «Malkuraĝeco».

*Tradukitaj tekstoj.* — I La Vaca Cega. N<sup>o</sup> 11-2 : «El ĉiuj estaĵoj la blinda, sendube la plej kompatinda».

II Conformitat. N<sup>o</sup> 54-5 : «Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras».

*Eksterordinaraj Temoj.* — I La Ratlla. N<sup>o</sup> 35-5 : «Kripligo».

III Kolekto de Katalunaj modismoj. Ne premiita.

IV Temo de Sro. Fred. Pujulà. N<sup>o</sup> 6-1 : «Katalunlando».

V Temo de la «Círculo de Tarragona». Ne premiita.

VIII Temo de «Catalunya Nova». N<sup>o</sup> 38-1 : «Vi frato alveninta de malproksima tero en nia varma hejmo ripozu post la ven'».

IX Temoj de Sro. Direktoro de la «Institut de Tarragona» kaj de la «Cambra de Comerç». N<sup>o</sup> 61-8 : «Ankoraŭ» kaj n<sup>o</sup> 41-2 : «Ĉu...?»

X Temo de la «Patronato del Obrero». N<sup>o</sup> 56-1 : «Frato helpita de aliaj fratoj estas forta urbo».

Ĉar la juĝantaro opinias, ke neniu el la premiitaj originalaj tekstoj meritas la Naturan Floron nek la rajton elekti reĝinon de la festo pro la dirotaj en la Literatura Festo kaŭzoj, ĝi transdonas tiujn rajtojn al manuskripto n<sup>o</sup> 11-2, traduko de «La Vaca Cega».

Dro. J. Bremón, Fred. Pujulà, G. Galcerán, A. Codorniu, J. Rosals, D. Serdà.

Grava rimarko : La aŭtoroj de la premiitaj manuskriptoj bonvolu sendi al sidejo de « K. E. F. » la kvin unuajn kaj lastajn liniojn de siaj manuskriptoj kune kun la nomo kaj adreso. Tiu ĉi peto estas precipe adresata al aŭtoro de la verko n<sup>o</sup> 11-2 : « El ĉiuj estaĵoj la blinda, sendube la plej kompatinda ».



## PROGRAMA PERA 'LS EXAMENS DEL TITOL DE PROFESSOR D'ESPERANTO

### I

• Prononciació de les vocals. — Prononciació de *b* y *v*. — Prononciació de la combinació *kv*. — Prononciació de la *s* precedint consonant y començant paraula : (*stari, speco, slango, scii*, etc.) — Prononciació de les combinacions *ŝp, ŝr, ŝl, ŝt*. — Manera de fer compendre la emisió d'aquests sóns. — Prononciació de les altres lletres del alfabet Esperanto. — Accent.

### II

ARTICLE. — Articles catalans. — Pera que serveixen? — Article en Esperanto. — Pera que serveix? — Traducció dels articles indeterminats *un, una, uns, unes*. — Comparació d'aquests articles ab els numerals *un, una*, y manera de distingirlos entre si. — Traducció de *En, Na*. — Comparació dels articles *el, la, lo* ab els pronoms *el, la, lo* acusatius dels pronoms personals *ell, ella*, y manera de distingirlos entre si. — Substitució de la vocal per l'apostrofit; quan se pot fer?

### III

SUBSTANTIU. — Altres parts de la oració qui devenen substantius en català y com se reconeixen. — Terminacions del substantiu en Esperanto. — Declinació en català y en Esperanto. — Conserva el català alguns casos de declinació pura? — Genre y nombre. — Acusatiu; explicació d'aquest cas. — Distinció entre el complement directe y l'indirecte. — Elisió de la terminació substantiva y sa substitució per l'apostrofit.



## IV

ADJECTIU. — Genre; nombre. — Declinació. — Acusatiu; explicació d'aquest cas. — Acusatiu de claretat. — Comparatiu (de superioritat, d'inferioritat, d'igualtat). — Casos en que 'l segon terme d'una comparació està en acusatiu. — Superlatiu. — Diferència entre *molt* superlatiu, adjectiu y adverbi. — Participis ab terminació adjectiva.

## V

NUMERALS CARDINALS. (Terminacions *o, e*). — Se declinen? — Traducció del mot català *hu*. — Traducció de *hu* en la frase *no es tot hu*. — *Dos, dues*; casos en que 'ls traduhirem per *ambaŭ*. — NUMERALS ORDINALS. — Genre, nombre. — Declinació. — Acusatiu; explicació d'aquest cas. — NUMERALS MULTIPLICATIUS. (Terminacions *o, a, e*). — Declinació. — Acusatiu; explicació d'aquest cas. — NUMERALS FRACCIONARIS. — (Terminacions *o, a, e*). — Declinació. — Acusatiu; explicació d'aquest cas. — NUMERALS COLECTIUS. (Terminacions *o, a, e*). — Declinació. — Acusatiu; explicació d'aquest cas. — Partícula *po*.

## VI

PRONOMS. — Sa característica. — PRONOMS PERSONALS. — Partícula catalana *ho*. — Casos en que la traduhirem per *ĝi, tio, tia* o *tiel*. — Casos en que la traduhirem per *ja*. — PRONOM PERSONAL REFLEXIU. — Genre, nombre, declinació. — Acusatiu; explicació d'aquest cas. — Comparació dels articles catalans *el, la, lo*, ab els pronoms *el, la, lo* acusatius de *ell, ella*. — PRONOMS POSSESIUS. — Genre, nombre, declinació. — Acusatiu; explicació d'aquest cas. — POSSESIU REFLEXIU. — Genre, nombre, declinació. — Acusatiu; explicació d'aquest cas.

## VII

MOTS SIMPLES PRONOMINALS, substantius, adjectius, personals y possessius. — Declinació; explicació del cas acusatiu. — Traducció dels pronoms catalans *qui, que*. — Regles a seguir. — Partícula *ajn*. ORACIONS INTERROGATIVES. — ORACIONS NEGATIVES.

## VIII

VERB. — Explicació de la regla 6 del *Fundamento de Esperanto*. — INFINITIU. — Manera de conèixer quan en català l'infinitiu devé

substantiu, — Preposicions que poden usarse devant d'ell y rahó que justifica aquesta aparent excepció de la regla general. — INDICATIU. — Sos temps. — Manera de traduhir l'imperfet. — Lògica en l'ús dels temps del indicatiu. — CONDICIONAL. — IMPERATIU. — SUBJUNTIU. — Quan traduhirem aquest modo pel condicional, quan pel l'imperatiu y quan pel futur? — VERB SUBSTANTIU. — VERBS IMPERSONALS.

## IX

VERB. — Sa divisió en Esperanto en verbs transitius y verbs intransitius. — Explicació dels dos grupus. — Manera de coneixer si un verb es transitiu. — ACUSATIU. — Els participis regeixen acusatiu? — Acusatiu de direcció. — Regla 13.<sup>a</sup> del FUNDAMENTO. — Quines parts de la oració son susceptibles de pendrel? — Quins adverbis el poden pendre?

## X

PARTICIPI. — Els participis en català. — Com se expressa en català els temps passat de la forma activa. — El participi en Esperanto. — Participi Esperanto ab les terminacions gramaticals *o*, *a*, *e*. — Com traduhirem els participis actius catalans? — Com traduhirem els participis passius catalans? — Quins participis prenen femení en català? — Quins el prenen en Esperanto? — Nombre y declinació. — Explicació del cas acusatiu. — Quina terminació prenen els participis de verbs impersonals?

## XI

ACUSATIU. — Verb transitius y intransitius. — Complementes directe y indirecte. — Acusatiu de claretat. — Acusatiu de direcció. — Acusatiu per supressió de preposicions. — Parts de l'oració qui poden pendre l'acusatiu.

## XII

ADVERBI. — Explicació d'aquesta part de l'oració. — Adverbis en *aŭ*. — Terminació gramatical *e*. — Quan traduhirem el mot català *ho* per un adverbí? — Comparació entre *plu*, *pli* y *plej*. — S'usa *plu* en les oracions afirmatives? — Participi ab terminació adverbial. — ACUSATIU. — Explicació d'aquest cas. — Quins adverbis poden pendrel.

## XIII

MOTS SIMPLES ADVERBIALS, de quantitat, de temps, de causa, de modo, de espay. — Quins d'ells prenen acusatiu? — Explicació d'aquest cas. — Diverses traduccions del mot català *tot*. — Quan el traduhirem per *ĉio, ĉiu, ĉiom, ĉie, tuta, tute*. — Diverses traduccions del mot català *que*. — Quan el traduhirem per *ol, kiom, kiel, kiam, kial, ke?* — Partícula *ajn*. — ORACIONS INTERROGATIVES. — ORACIONS NEGATIVES.

## XIV

PREPOSICIÓ. — Explicació d'aquesta part de l'oració. — Regla 14.<sup>a</sup> del FUNDAMENTO. — DECLINACIÓ. — ACUSATIU. — Complement directe y indirecte. — Acusatiu usat en lloch de les preposicions. — Preposicions qui poden acompanyar a l'infinitiu. — Quina rahó dóna el doctor Zamenhof pera aclarir aquesta aparent escepció? — Comparació entre *el, de y da*. — Explicacions sobre *pri, per, krom, for*, etc.

## XV

CONJUNCIÓ. — Explicació d'aquesta part de l'oració. — Comparació entre *kvazaŭ y kiel*. — Advertencia a fer sobre la paraula *donchs* catalana usada en el sentit de *car, per què*. — Diversos valors del mot català *que*. — INTERJECCIÓ. — Explicació d'aquesta part de l'oració.

## XVI

AFIXES. — PREFIXES. — *Bo, dis, ge, mal, pra, ek, re*. — Preposicions usades com a tals. — *Ne, sen*. — SUFIXES. — *Ad, ig, iĝ, iz*. — *Ad*, y l'imperfet dels verbs. — Us dels sufixes *ig, iĝ*.

## XVII

SUFIXES. — *Ul, ist, an, il, uj, ej, ar, aĵ, ind, er, estr, id*. — *Ec, ebl, ind, em, eg, et, oz, aĉ*. — Comparació entre 'ls sufixes *ul, ist, an* y les terminacions del participi *anto, into, onto*.



## LA URBO DE NIA KONGRESO

(Sekvo)

*Temple d'August* (Templo de Aŭgusto). Nur konserviĝas moneroj riprezentante la templon, kaj fragmentoj de kapitejoj kaj kornicoj.

El la *Temple de Júpiter* (Templo de Jupitero) oni profitis la ŝtonojn por konstrui la Katedralon, konserviĝas mirindaj restoj de marmoraj belaj reliefoj, medalionoj, kapitejoj, kornicoj k. t. p.

*Amfiteatre* (Amfiteatro). Ĝi partoformis la apudurbaĵon. Ĉi tiun verkon oni atribuas al *Stalio Tauro*, kiu konstruis tiun de Romo. Li estis pretoro de Tarragona. Ĉi tiun arenon sangè ŝprucis la martiroj Fructuoso, Aŭgurio kaj Eŭlogio. Pli malfrue oni konstruis sur tiun arenon, templon al *Ntra. Sra. del Miracle*, belan romantan ekzempleron.

*Teatro*. Nur konserviĝas la restoj de ĝiaj benkoŝtupoj kaj ĉe la Muzeo — la maskoj de la aktoroj.

*Torre dels Scipions* (Turo de la Scipionoj). Ĝi estas kvadratforma, havas du statuojn altreliefajn kaj bone skulptitajn, vestitajn per togoj. En la alta parto estas surskribaĵo. Ĝi estas je 6 kilometroj malproksime de Tarragona.

*Arc de Barà* (Arko de Barao). Estas unu el la plej bone konservitaj monumentoj de la Roma epoko. Kiam oni ĝin rigardas ĝi naskas gravan respekton al si. Ĝi estas alta je 12'08 metroj, kaj la arko estas 4'69 metroj alta. Ĝi estis renovigita en la jaro 1840. Ĉi tiun konstruaĵon kaj la antaŭan oni povas vidi de la vagonaro Barcelona-Tarragona.

*Medo*. Antikva Roma ŝtonmino, inda je vizito pro ĝiaj fantastikaj efektoj je vegetaĵoj. Proksime estas *Tamarit'* ruinigita forlasita vilaĝo, kiu en sia unua epoko estis araba observejo.

*Aqueducate* (Akvokonduko). *Pont del Diable* (Ponto de la Diablo). Ĝi estas ĉe la ĉefvojo de Tarragona al Lleyda malproksime je 4 kilometroj; per ĝi la Romanoj ricevis la akvon de la rivero Gayà. Ĝi konsistas el du mirindaj vicoj de supermetitaj arkoj; 11 en la suba vico kaj 25 en la supera. Ĝia maksimuma alto estas 40 metroj kaj ĝi estas 217 metrojn longa.

*Centelles*. En ĝia unua epoko ĝi estis varmobanejo. Poste ĝi fariĝis religia restadejo. Estas rimarkinda ĝia mirinda mozaiko en kupolo je 10 metroj de diametro, el paganaj motivoj. Oni kredas ke ĝin konstruis *Adria*. Ĝi estas unu horo malproksime de Tarragona, kaj vere estas vizitinda.

*Museu.* Ĝi estas en la teretaĝoj de la Urbodomo kaj Deputatdomo.

Ĝi konsistas el 3 salonoj, en kiuj estas kolektitaj ĉiuspecaj historiaj estintaj artaĵoj, el arkitekturo, ceramiko, skulptarto; kaj plie armiloj, vitraĵoj, aŭtografoj, moneroj, pentraĵoj, tomboŝtonoj, kaj surskribaĵoj, k. t. p., k. t. p.

*Provinca Biblioteko.* Ĝi enhavas ĉirkaŭe 20,000 verkojn. La kolektoj de manuskriptoj, kodoj, *cartularis* (cartulario cast., cartulaire fr.) estas la plej antikvaj el la XIII<sup>a</sup> jarcento kaj aparteninta al Poblet. Ankaŭ multenombraj estas la inkunabloj.

*Katedralo.* Ĝia fundamento formas laturan krucon de la komenco de la XII<sup>a</sup> jarcento. Ĝi staras en la plej alta loko de la urbo, kaj estas belega ekzemplero el romarto de la unua epoko. Ĝia fasado majeste leviĝas; ĝia sojlo estas longa je 6'80 metroj kaj la centra kolono estas 5'92 metrojn alta.

Estas tute interesaj: la granda baptopelvo pro tio, ke ĝi estis banopelvo de la imperiestro Aŭgusto; ankaŭ la tombo de la reĝo Jaume I; la figuroj de la kapelo de la «Sant Sepulcre»; la ĥorejo (1445) kun ĝiaj sennombraj polikromaj libroj; ĝia orgeno modelo el sia klaso; la kapelo de la Sakramento pro ĝiaj surmuraj pentraĵoj de Isaak Hermes, kaj tiu de la Plej Sankta Virgulino.

Estas vizitinda la Apsido kun ĝia ĉefaltaro kiu estas arta juvelo kaj unu el la plej belaj en Hispanujo; la *retaulo* kiun konstruigis la Ĉefepiskopo Tello, mirinda verko el gota arto kun kiu alia en la mondo povas nek konkuri nek esti komparata; la tombo de la infanto *Joan d' Aragó*, k. t. p.

*Claustre* (Klaŭstro). Ĝin komencigis la ĉefepiskopo *Tort* por instali en ĝi la komunumon de kanonikoj (1146) kaj ĝi estis konstruita sur ruinaĵoj de la *Arce-romana*. Ĝi estas vera muzeo de kapideloj — kaj el ili estas fama en la mondo tiu de la *professó de les rates* (procesio de ratoj); — la *bizanca* pordo kiu alitempe anstataŭis la pordon de la fasado; la restoj el romana kaj gota arkitekturo de ĝiaj muroj; la kapelo de la «Corpus-Christi» kaj salono del Kapitolo kun ĝiaj interesaj tapiŝoj kaj la morta drapo de la reĝoj kiu estis posedaĵo de Poblet, la multvalora kolekto de tapiŝoj, k. t. p.

*Portal de Sant Antoni* (Portalo de Sankta Antono). Ĝi estas el marmoro kaj ĝin konstruigis Ferran VI en 1757. Antaŭ ĝi staras la bela gota kruco nomata kruco de *Sant Antoni* (Sankta Antono)!

## ENLANDA MOVADO

## BARCELONA

*Ekskursoj.* — La grupo «Esperanto kaj Patrujo» organizis ekskurson al la fonto de «Mas Guimbau» (Vallvidrera) okazintan la 30<sup>an</sup> de Aprilo. La ĉeestantoj estis multenombraj kaj multajn fraŭlinojn oni vidis inter ili.

La esperantista grupo «Kulturo» vizitis, la saman tagon, la Hospitalon de Sant Pau. Kvankam ĝi estas ankoraŭ konstruata ili povis admiri la belan verkon de la fama arkitekturisto Sro. Domenech i Muntaner.

La Ekskursa Fako de la grupo «Ĉiam Antaŭen» decidis inaŭguri serion de ekskursoj, kiuj samtempe estos agoj de propagando ĉar dum ili oni disdonas «Tot l'Esperanto en una fulla» al la loĝantoj de la urbetoj kaj vilaĝoj kiujn oni vizitos dum la ekskurso.

La aprilan monaton oni faris ekskurson de Badalona al Moncada tra Montalegre, Sant Fost kaj Ripollet.

Al Cabanyes, Reixac, Torre Pallaresa kaj Santa Coloma oni ekskursis la 21<sup>an</sup> de Majo.

Ni deziras al tiaj propagandagoj grandan sukceson.

*Nova grupo.* — Oni fondis grupon, kies sidejo estas Strato Mariano Cubi, 160 (Sant Gervasi), sub la nomo «Esperanta Aŭroro».

En tiu grupo estis malfermataj du kursoj okazantaj lundojn kaj ĵaŭdojn la elementa kurso, kaj mardojn kaj vendredojn la supera kurso. Ambaŭ de la 8<sup>a</sup> kaj  $\frac{1}{2}$  ĝis la 10<sup>a</sup>.

*Parolado.* — La lasta «Esperantista Vendredo» ĉe la agema «Grupo Semo» konsistis el la anoncita parolado de nia Kataluna pioniro kaj kara amiko Sro. Fred. Pujulà.

Ĉirkaŭ 100 gesamideanojn kunvenigis la anonco de ties parolado.

Sro. Pujulà rakontis historiaĵojn de la urbo de la «Sepa» pri kies nomo, Antverpeno, li sciigis la devenon. Per multaj kliŝaĵoj li vidigis Antverpenon kaj ĝian gravecon: artajn trezorojn, grandan riveregon Skeldon kaj ĝiajn vastajn havenojn, instalajojn, monumentojn, belegan Zoologian ĝardenon, vivplenajn stratojn, k. a. Kaj tion faris Sro. Pujulà tre allogge. Kiel plej bona laŭdo por lia parolado, jen ĝiaj finaj frazoj:

«Jen estas la kelkaj vidaĵoj kaj informoj pri Antverpeno, kiujn mi deziris prezenti al vi. Mi esperas ke ili naskos ĉe vi la premantan deziron viziti kaj observi vi mem senpere tiun belegan urbon, juvelo de la nordaj landoj, centro de agado, de inteligento kaj de noblaj aspiroj, industria svarmejo, ekzemplo de kuraĝo kaj persisteco, kiu sciis glori eligi el la cindroj, kiujn ĵetis sur ĝin barbaraj premadoj!

Sed memoru bone: kiam oni vizitas alilandan urbon, eĉ enlandan urbon, en kiu oni ne havas konatojn nek amikojn nek estimajn rilatojn, oni sin sentas sola, des pli sola ju pli granda estas la belo kaj la alloganteco de la vizitata

urbo. Oni sentas, kiel antaŭ ĉia mirinda spektaklo en la mondo, la bezonon komuniki al proksimulo siajn internajn impresojn.

Memoru bone : dank'al Esperanto, kiām vi iros al Antverpenc, vi ne estos tie fremduloj. vi ne estos solaj, vi renkontos tie fervorajn amikojn, kies amo al Internacia Lingvo inklinos ilin al via servo kaj helpo, kaj se vi iros al Antverpeno dum la 7<sup>a</sup> Internacia Kongreso de Esperanto, kiu okazos on Aŭgusto, ne nur amikojn, tutan familion vi renkontos, ĉe kiu vi vin sentos feliĉaj esti homoj kaj ĝui en la belega scenejo, kiun mi prezentis al vi, la belegan altajn sentojn de homa interfratiĝo kaj alproksimiĝo paca.»

La tuta aŭdintaro premiis tiun paroladon per longa aplaŭdego.

*Esperantistaj vendredoj.* — En la sama grupo okazis tri kunvenojn en kiuj oni daŭrigis la interparoladojn por la starigo de unika barcelona grupo. Ni deziras sukceson al la iniciatintoj de tiu afero.

*Al nia kongreso!* — La entuziasmo por ĉeesti nian kongreson pli kaj pli vekigās en niaj barcelonaj samideanoj; en privataj kaj publikaj babiladoj oni ofte aŭdas preparoli tiun aferon kaj oni povas certigi, ke la barcelona samideano estos bone reprezentata en Tarragono.

#### SABADELL

La grupo «*Esperanta Semo*» organizas paroladon kun lumbildoj pri Antverpeno. Kredeble ĝin faros nia kamarado Fred. Pujulà.

«*Katolika Stelo*» faris ekskurso-viziton al grupo «*Lumon!*» de Terrassa.

«*Aplec Esperanta Grupo*» malfermis novan kurson por virinoj.

La Esperanta Sekcio de la C. de D' del C. i de la I. forlasis por nova okazo la ideon fari publikan propagandan akton.

#### TERRASSA

Novan fojon la kataluna esperantistaro perdis unu el siaj plej lertaj kaj kleraj anoj : Ptron. Jaume Muixí, skolpiulo. De antaŭ longe li propagandis nian Esperanton ĉu skribe ĉu parole, lernigante ĝin senescepte al ĉiuj. Li fondis en Castellar del Vallés Esperantan Grupon, kaj helpis la starigadon de nia Grupo Lumon! Li sukcesis atingi permeson por instrui nian internacian lingvon ĉe la lernejo de Skolpiuloj de Terrassa, kies li estis profesoro, al infanoj kaj knaboj.

Ankaŭ li estis unu el plej fervoraj partianoj de «*K. E. F.*» al kiu ĝi tuje aniĝis kaj helpis, kaj kiun propagandis inter niaj samurbanoj. Lia fervoro por nia celo estis tia, ke li cĉe dum la tre longa malsano, kiu lin forprenis de ni, ne ĉesis labori por nia kara lingvo Afabla kaj tre humila sciis alvarbi ĉiujn al sia simpátia kaj sindona amikeco.

Nia katalunaj lingvo kaj literaturo perdis ankaŭ fervorulon. La paco al nia plorinda estimata kamarado!

## VALENCIA

Post la vizitado al kelkaj gravaj eŭropaj urboj, pola Dro. Martin Steckiewicz, kuracisto de la Rusa Militistaro honoris per sia vizito Valencion, en kiu li jam de kelkatempo havis korespondantinojn.

Okaze de tiu vizito, la 8<sup>an</sup> de Majo, tiu klera pola esperantisto faris paroladon en la sidejo de la Esperantista Grupo. Kompreneble, en tiu parolado li montrigis mirigita de la gastama frateco, per kiu li estis akceptita ĉie, de la geesperantistoj, dediĉante apartan paragrafon al la Barcelonaj geesperantistoj, kies gastamecon, li neniam forgesos. Malgraŭ lia homfido, li ankaŭ montrigis surprizita de la progresado de nia lingvo en tiuj de li travizititaj landoj, precipe en Katalunujo, kies nuna stato de propagando kaj progresado estas imitinda. Tiu parolado estis tre aplaudita de la ĉeestantaro, en kiu troviĝis briligante la feston multe da valenciaj esperantistinoj, kies nombro, preskaŭ nerimarkebla dum la memorinda Postkongreso (Septembro 1909<sup>a</sup>), estas nuntempe, ja, atentiga.

La kvintaga restado de Dro. Steckiewicz en Valencio, certe estos neforgesebla, tiel por la klera pola doktoro, kiel por la Valenciaj geesperantistoj, kiuj gardos ĉiam ĉe la koro, la memoron pri tia fratiga vizito, kaj esperas novan okazon por interfratiĝi kun ĉiulandaj samideanoj. — *Angelo Novejarque.*



## POR LA NEFEDERACIOJ

Kiam ni estas en ĝojo, kiam la bruo kaj laboro de la Kongreso surdigas niajn sentojn per ĝojo kaj entuziasmo, frapo de samcelanoj nin dolorigas en la animo. Ni, kiuj de antaŭ longe nin liveris al Esperantismo kaj al propagando de Esperanto kun tuta abnegacio, kun tuta sindonemeco, kun tuta humileco; ni, kiuj ĉiupaŝe semas kaj vokas pacon; ni, kiuj lasas sen timo nek dubo ia la pordon de nia organizado tute malfermita; ni, kies vojon ni sekvas tute en rekta linio, kaj kies proponoj ne estas suspektaj pro tio ke ni ilin klarigas en la lumo de la tago kaj per skribaĵoj, ne sukcesas kompreni tion, kion enlandaj samcelanoj agis rilate al ni.

Jen ĝi: ni sendis al la tremalmultenombraj ne aliĝintaj al «K. E. F.» grupoj, cirkuleron petantan ilian aniĝon al nia Federacio, aŭ almenaŭ ilian nean respondon, en la celo koni niajn — laŭ ilia kredo — malperfektaĵojn de organizado. *Neniu respondis al ni!* Eĉ en plej primitivaj landoj la organizitaj societoj ricevintaj petantan skribaĵon atente respondas pli malpli longe. Tion ja konsilas la bona edukiteco. Ni estas en civilizita lando, ni loĝas kaj havas rilatojn kun civilizitaj homoj batalantaj por la grava celo *fratigi la homojn*, kiel ni mem batalas, kaj tamen oni ne respondas al frato, al samcelano, al samlandano. Jen plej granda aberacio!

Se ni ne estus tiaj, kiaj ni estas, tia fakto ne estus nin dolorinte; sed ĝin ni ricevas de homoj, kiuj sin nomas fratoj niaj kaj samcelanoj. Ni certe ne scias konvinkiĝi pri la konduto kaj celo de tiaj fratoj. Sed eĉ en doloro ni ne malesperas! For de ni la cinikaĵoj kaj ironioj. Ni ne fermas la pordon nian, kaj ankoraŭ ĉiu sur ĝi povas legi:

«La kontraŭcelulojn konvinkiĝi;  
la indiferentulojn alvarbi;  
al samcelanoj, saluton;  
al ĉiuj respekton!»